

La vintra kaj printempa kursprogramo de la
Internacia Feria Altlernejo (IFA) de KCE
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.11.13

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-182/Radiokasedo-182-23-86-B-1138-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-vintra-kaj-printempa-kursprogramo-de-la-Internacia-Feria-Altlernejo-de-KCE.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Jam nun estas riceveblaj la programo de la kursoj, staĝoj kaj seminarioj, kiujn Kultura Centro Esperantista organizos en 1987. Ni prezentos al vi tiujn okazantaĵojn per lego el la informiloj, kiujn vi povas peti tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

A.- De la 26-a de decembro ĝis la 3-a de januaro 1987 disvolviĝos vintro-ferio kun promen-skiado kaj natur-sciencia programo. D-ro Ottó HASZPRA, profesoro de hidromekaniko kaj hidrauliko en la Budapeŝta Teknika Universitato prelegos pri la temo akvo. Ni intimiĝos kun la gasaj, likvaj, solidaj statoj kaj aperoj de la akvo en la naturo, pri la hidrologia cirkulado, pri riveroj, lagoj, maroj, subteraj akvoresursoj kaj pri multaj aktualaj problemoj ligitaj al la utiligoj de la akvo por trinkado, agrikultura akvumado, industria uzo, energi-produktado, ktp.

Cl.- Ĉiujare tiuj prelegoj matenaj estas ege riĉigaj. Estas fakte privilegio povi esti en intima kontakto kun fakulo, kiu pretas transdoni siajn konojn al feriantoj. Ofte la konversacioj dum la manĝoj estas kvazaŭ plilongigo de tiuj, kiujn naskis la prelegoj.

A.- Posttagmeze gvidataj ski-promenadoj kondukas la feriantojn en belajn lokojn. Eĉ ski-komencantoj povas ĝui pri tiuj promenadoj, kiuj elektas facilajn vojojn. Kelkfoje foriro okazas antaŭ la tagmanĝo kaj piknikado disvolviĝas en montaraj gastejoj.

Cl.- La vesperojn vigligas ludoj, dancoj, kantoj, festoj aŭ lumbildaj prelegoj. Estas ĉiam agrable konkludi jaron kaj komenci novan en tiu samideana etoso. Tial ne hezitu peti la informilon pri tiu vintro-feriado, kiu disvolviĝos de la 26-a de decembro 1986 ĝis la 3-a de januaro 1987 en La Chaux-de-Fonds kaj ties cirkaŭaĵoj kun espereble multe da neĝo. Se ĝi mankos, tiam organiziĝos piediraj migradoj.

A.- La programo de Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista proponas tre interesajn kursojn, kiuj ĝenerale malfermiĝas la lundon matene kaj konkludiĝas la sekvan sabaton. Kelkfoje ili estas sekvataj de semajnfina aranĝo. Jen ni legas al vi informojn pri tiuj okazantaĵoj.

Cl.- De la 9-a ĝis la 14-a de februaro la studotemo estos ANDERSEN KAJ ESPERANTO. Instruos d-ro Dirk WILLKOMMEN, germano, fakulo pri la skandinavaj lingvoj kaj literaturoj, redaktoro de la revuo "Esperanto Aktuell". La kursresumo diras:

A.- "La dana verkisto Hans Christian ANDERSEN estas nun precipe konata pro siaj fabeloj. Sed kiam ili aperis, li estis jam konata aŭtoro de teatraĵoj, kaj internaci-nivele ĉefe pro siaj romanoj kaj vojaĝ-raportoj. Liaj fabeloj, alparolante la infanojn, tamen ankaŭ alcelas la plenkreskan legantaron, liverante sufiĉe da personaj pensoj kaj biografiaĵoj. ZAMENHOF,

dum la unuaj dek ses jaroj de sia vivo samtempulo de ANDERSEN, tradukis grandan parton de lia fabelaro. Ekster sia propra literatura valoro la tradukoj estas riĉa fonto de klasika zamenhofa lingvaĵo, kaj pro la kompareblo kun la germanlingvaj originaloj uzitaj de ZAMENHOF, ili multon malkaŝas ekzemple pri la participa lingvouzo. La kurso samtempe konatigos la danan aŭtoron kaj ties fabelan verkaron kaj studigos la zamenhofan lingvon. Promenado kondukos al Le Locle kaj Les Brenets kie ANDERSEN restadis.

Cl.- La postan semajnon, tio estas de la 16-a ĝis la 21-a de februaro la studotemo estos Pensmanieroj okcidenta kaj orienta. Prelegos d-ro Eugène DE ZILAH, franco, licea profesoro pri filozofio kaj universitata profesoro pri aplikita logiko, redaktoro de la organoj Horizonto kaj La Gazeto.

A.- Jen resume la skemo de la kurso proponita: difino de "Oriento" kaj "Okcidento". Kiel kaj kial okcidentano interesiĝas pri Oriento kaj orientano pri Okcidento? ĉu ekzistas tipecaj pensmanieroj orientaj kaj okcidentaj? La "Dao" ĉe Lao Zi kompare al la "Esto" de Parmenido. La "brahman neŭtrala" ĉe ŝankara kompare al la "Dio" Semida. La "Absoluto" laŭ la Vedanto kompare al la "Absoluto" ĉe Hegel. "Ahamkara" kaj "ego substanta", "atman" kaj "konscio", "manas" kaj "racio". Strukturo de la "libido" ĉe Kartezio, Pascal kaj Freud, kompare al la "deziroj" budhismaj. "vero" kaj "realo" en la okcidenta penso kaj la vedanta "sat". Okcidenta "kreismo" kaj la orienta "aum", ktp.

Cl.- Tiu ĉi kurso, kiu disvolviĝos la matenon, kio ebligos promenskii posttagmeze, estos tutcerte ege pens-riĉiga. Kaj oni povas antaŭvidi, ke la vesperojn vigligos interesaj prifilozofiaj diskutoj.

A.- La antaŭpaska semajno, 13-a ĝis la 18-a de aprilo, proponas intensivan pretiĝon al trapaso de esperanto-ekzamenoj. Instruos mia edzo. La kursresumo diras: Multaj hezitas sin prezenti en sesio de esperanto-ekzamenoj pro manko de kritikaj konsiloj. Aro da precizaj ekzercoj individuigitaj kaj grupaj ebligas al ĉiu malkovri la proprajn mankojn kaj venki ilin per serioj da taskoj: korekto kaj transformo de gramatike kaj stile nekontentigaj tekstoj, esperantigoj de tre diversaj dokumentoj, konsulto de fundamentaj libroj, parolaj raportoj pri legajoj, ktp.

Cl.- Dum la plilongigita paska semajnfino, tio estas de la 18-a ĝis la 20-a de aprilo, mi gvidos promenadojn tra la montaro ĵuraso.

A.- Dum la montosuproj apenaŭ senneĝiĝas, en la valoj jam buntas la floroj. La vaŭkluzaj fontoj tipaj je karsta regiono naskas riveregojn kaj estas agrable migradi en la akvoplenaj gorĝoj. Ne nur en la Centro mem disvolviĝos la klarigaj prelegoj al la vizitotaj karakterizaĵoj, sed ankaŭ en kamparaj kafejoj, kie oni piknikos. Tiu kultura turismo lasos al ĉiuj neforgeseblajn rememorojn intimigajn kun varia kaj tre bela regiono, kiun oni ĝenerale vizitas en aliaj sezonoj, kvankam la aprila havas proprajn ĉarmojn.

Cl.- La venontan semajnon ni detale prezentos la postajn kursojn printempajn, somerajn kaj eble aŭtunajn. Oni sciu, ke paralele al tiuj ĉi kursoj disvolviĝos tre ofte esperanto-stagoj por komencantoj. Tio signifas, ke interesatoj povas veni familie. La familianoj, kiuj ne kapablas partopreni la kursojn de Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista pro nesufiĉa lingvo-disvolviĝo aŭ pro sia junaĝo, povas ekintimiĝi kun la lingvo esperanto pere de

la paroliga instruado praktikata en La Chaux-de-Fonds. La pedagogoj kaj kursgvidantoj interesataj pri la instruteknikoj programita, perbilda, aŭdvida kaj struktur-ŝanĝiga, povas aliĝi al tiuj esperanto-staĝoj kiel pedagogo-staĝuloj. Ili ricevos metodikajn sciigojn kaj havos la eblon kunlabori al la instruado.

A.- Ni menciu, ke pedagogia seminario disvolviĝos dum kvar semajnfinoj de la jaro 1987.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND raportis pri kursoj okazontaj la venontan vintron kaj paskan semajnon. Venontsemajne ili anoncos la kursojn, kiuj okazos en la printempo, somero kaj aŭtuno de 1987.

Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*